Rilate al la diversaj kontinentoj la pocentoj estas jenaj:

| | Afriko | Ameriko | Azio | Aŭstralio | Eŭropo |
|---|---|---|---|---|---|
| Romkatolikoj: | 3,8 | 53,1 | 1,7 | 22 | 42,9 |
| Konfucianoj: | | | 30,5 | | |
| Hinduanoj: | | | 22,5 | | |
| Mahometanoj: | 37,1 | 0,1 | 17,9 | 0,1 | 1,8 |
| Budhanoj: | 0,1 | | 20 | | |
| Protestantoj: | 3,5 | 15,4 | 0,5 | 62,4 | 24,3 |
| Ortodoksaj: | 3,4 | 0,4 | 0,5 | 4,1 | 25,3 |
| Idolanoj: | 51,2 | 1 | 4,6 | 11,2 | |
| Neeklezianoj: | | 27,8 | | | 2,2 |
| Ŝintoistoj: | | | 1,7 | | |
| Judoj: | 0,3 | 1,8 | | | 2,3 |
| Nekonatoj: | 0,6 | 0,4 | 0,1 | 0,2 | 0,6 |
| | 100 | 100 | 100 | 100 | 99,4 |

*11 761.*

## El Germanio.

Laŭ ordono de la prusia kultministerio neeklezianoj-juninstruistoj dume ne plu estos dungataj en publikaj lernejoj.

Proceso, komencita pro tio de la „Germana Liberpensula Unuiĝo“ k la „Universala Libera Instruist-Sindikato“ kontraŭ la prusia ŝtato, estas perdita en la dua instanco antaŭ la supera kortumo en Berlin.

*Laŭ „La Fajrero“ (1. 5. 32).*

En la subŝtato Brunsvigo (Braŭnŝvajg) la nacisocialista ministro Klagges ordonis la malpermeson de la bone funkciintaj laikaj lernejoj. Liaj pretekstoj estis sufiĉe stultaj k senĝenaj: „La instruistoj de la laikaj lernejoj malbone plenumis sian oficon. El la lernejoj ili faris karikaturon de l' germana popollernejo. En multaj klasoj regas pedagogia ĥaoso. La infanoj estas edukitaj al nesufiĉa devo-konscio.“

*Laŭ „La Liberpensulo“ (1. 5. 32).*

### La plej trafa respondo.

En nia urbeto mortis komunistino, ankoraŭ membro de l'eklezio. La ĉefpastro unue rifuzis partopreni la entombigon: „Komunistinon mi ne entombigos!“ Tamen li fine konsentis paroladi ĉe la tombo. Tie li alparolis la ĉeestintajn Gek-dojn: „Ĉiuj vi, sendiuloj, kiuj vi estas kunvenintaj ĉi tie!“

La respondo al tia impertinenta parolado ne estis prokrastita longe. Dum baldaŭ okazinta kunveno granda parto de l'partoprenintoj decidis eksiĝi el la eklezio. Eksiĝis tiam 14 virinoj, 10 viroj k 7 infanoj. Ni nun klopodas instigi pliajn Gek-dojn, por ke ili eksiĝu. *16 900.*

## El Usono.

### Superstiĉo.

Dum la „simi-proceso“ en Detn-Tenesi (Dayton-Tennessee) miris multaj liberpensuloj pri la fakto, ke instruisto, klariginte al siaj lernantoj la evolu-teorion de Darvin, estis eksigata el la ofico, akuzata k kondamnata. — Jen pruvo pri la animstato de multaj instruistoj en Usono, precipe en la sudaj ŝtatoj:

Profesoro O. A. Boŭdn (Bowden) de la ŝtata instruista seminario en Nov-Meksiko, faris enketon ĉe instruistoj, negocistoj, metiistoj ktp. pri la demando, ĉu ili kredas, ke veterŝanĝoj k sanigoj povas esti atingataj per preĝado. — En la lasta kongreso de la Usona Instruista Unuiĝo en Nov-Orleano li publikigis la rezulton de la enketo: El 100 instruistoj 78 kredas al sanigoj per preĝado. Inter la aliaj profesioj 76 jesis la demandon.

*Laŭ „La Fajrero“ — 11 761.*

### Pri la kontraŭeklezia batalo en Meksikio.

Je la 21. 12. 1931, por la urbo k la ŝtato Meksiko estis dekretita, ke la nombro da pastroj en tiu ĉi distrikto ne estu pli alta ol 25; same la nombro da eklezioj havantaj permeson fari diservon estis fiksita je 25. Laŭ tiu dekreto do estas fermotaj 260 preĝejoj k kapeloj ĝis nun uzitaj por diservo.

Sama dekreto por la ŝtato Malsupra Kalifornio difinas la nombron da pastroj en tiu distrikto je 2.

Laŭ onidiroj ankaŭ en la ŝtato Jalisko oni intencas dekreti, ke la nombro da pastroj estu nur po du por 100 000 loĝantoj.

En la tutmeksikia parlamento, la deputito *Davila* proponis esprimi malaprobon al la gubernatoro de l'ŝtato Oaksaka, *Francisko Bopez Cortes*, ĉar ties edzino kunlaboris en komitato por pilgrimado. Same oni esprimu malaprobon al ĉiuj publikaj oficistoj, kiuj toleras la katolikan kredon en sia domo. La propono estis akceptita.

*Laŭ katolika fonto 16 900.*

### 551 petskriboj al la Vatikano por sanktuligo k beatuligo.[1]

Ne malpli ol 551 proponoj por sanktuligo k beatuligo estas senditaj al la Vatikano el la diversaj popoloj: 57-oble oni petas la sanktuligon, 494-oble la beatuligon. Interesa estas la nombro el la diversaj nacioj. Proponitaj kiel sanktuloj k beatuloj estas: 6 germanoj, 1 aŭstro, 116 francoj, 6 angloj, 1 ĉeĥo, 13 belgoj, 2 svisoj, 3 irlandanoj, 55 hispanoj, 2 holandanoj, 271 italoj, 6 hungaroj, 4 jugoslavoj, 4 portugaloj. Ho ve! kie restas la rusoj? Ĉu ili eble mem rezignis? Ni kredas, ke jes. Sed ne nur Eŭropo havas ĉielanojn. 12 usonanoj, 2 mez- k 21 sudamerikanoj, 24 azianoj k 2 aŭstralianoj estas maturaj por ĉielaj rezervitaj sidlokoj.

Ho ve! kion diros Hitler? Ĉu li ne riproĉos al Brüning? 116 francoj k nur 6 germanoj. Terurega afero! Ĉu la francoj eble estas favoritaj, ĉar ili jam delonge havas la disigon de ŝtato k eklezio? *W.*

[1] *Beata* (feliĉega); angle: *beatified*, france: *béat*, germane: *selig*.

## Stalin pli bone fartas per pano ol per preĝoj.

Por esti sufiĉe informata mi legas ne nur avangardajn, sed eĉ reakciajn gazetojn, el kiuj ne malofte mi ĉerpas tre interesajn kontraŭdirojn. En portugala reakcia ĵurnalo „O seculo“ de 2. 4. 32 oni raportas pri portugala soldato, kiu antaŭ kelkaj jaroj entreprenis piedvojaĝon tra Eŭropo kun kelkaj amikoj, kiuj mortis dum la vojaĝo pro la klimato.

Reveninte al Portugalio li raportis, ke dum vizito al Romo li petis gastigon ĉe la papo, kiu konsentis ŝirmante lin dum 15 tagoj en la pilgrima hotelo. Poste li trapasis aliajn landojn, kies estraroj eĉ pagis al li la gastelspezojn. Sed en Sovetio oni postulis de li, tute senmona, ke li laboru almenaŭ 4 horojn ĉiutage ĉe fervoja konstruado por rajti konsumi. Li konsentis, kvankam grumblante, por 30 tagoj k povis dum tiu tempo rimarki, ke tie ne ekzistas nudpiedaj nek ĉifonitaj homoj; sed li aldonas, ke tamen li ne kredas al longtempa daŭro de l'reĝimo, ĉar tie mankas pastroj k preĝejoj estas transformataj en ŝtatajn grenejojn, al kiuj la laboristoj iras por sin provizi ... Mi emas kredi, ke se Stalin gastigus lin tiel parazite kiel la papo, li *certe* kredus al longtempa daŭro de l'reĝimo. Bedaŭrinde por li, li ne eksciis antaŭe, ke „ĉe Stalin tiu, kiu volas manĝi, devas labori“, dum ĉe la papo „sufiĉas *preĝi*“, por ke la fruktoj falu de la ĉielo tute maturaj. Konkludе li diris, ke ĉe sia reveno trapasante Hispanion, ankaŭ tute senmona, li estis devigata tie labori en minejoj por manĝi, sed li forgesis precizigi, kiom da horoj oni laborigis lin ĉiutage; pri tio mi mem povus diri miajn spertojn: Por ajna laboro la *minimuma* daŭro estas 8—12 horoj.

Kiomfoje tiu kompatinda soldato sopirus la sovetiajn 4 horojn! Se li ja estas ambicia! Tiutempe, en Sovetio, li sendube preferis la papojn k tial vizitis preĝejojn por rakonti al ekleziaj reprezentantoj sian ĉagrenon, sed ... feliĉe li nur trovis *panon*. *Soares.*

Por via perfektigo la plej taŭga legaĵo:

**UNUA LEGOLIBRO**

SAT-eldono. 104 pĝ. Prezo: 1 mk.g.
Administracio de SAT,
Leipzig O. 27.